# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 17/06/2021 Kvincenttridekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


## Entute 808,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **231,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **207,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).


THE ESPERANTO TEACHER

A text-book of the International Language with special emphasis on the needs of the non-grammarian and the home-student

by MASON STUTTARD
Licentiate, British Esperanto Association

7th Edition: 2000

Published by
Australian Esperanto Association
"Esperanto Domo"
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

N.ro 39 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kio estas la gramatika objekto en la suborda frazo en "Mi bedaŭras ke li manĝis la tutan torton"?

2) En la kombinita propozicio (= frazo) "Li manĝis, tio estas 'Li manĝaĉis', la tutan torton" ĉu estas 'li manĝaĉis'" estas subfrazo aŭ parto de la tuta kombinita frazo?

3). En "Li ĉiam estis fidela amiko',
a). kio estas la gramatika nomo de la parto "fidela amiko" ?
b). Kaj kio estas la parto "estis fidela amiko" ?


Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 535.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



La plej grava ideologia krizo pro kiu suferas la islama civilizacio Esperanta Retradio 9a Junio 2021

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton-Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**
Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 19a de junio estos la tria sabato. Venu!

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

## Estas kvar specoj de homoj, kiuj aliĝas al la militistaro.



1/ Por iuj, ĝi estas familia komerco.
2/ Aliaj estas patriotoj, fervoraj servi.
3/ Poste vi havas tiujn, kiuj nur bezonas laboron.
4/ Ankaŭ estas tiaj, kiuj volas la laŭleĝajn rimedojn
por mortigi aliajn homojn.
Citaĵo el la filmo ""*Jack Reacher*""

Notu:- la Universala Pensio nuligas la trian specon supre menciitan.
(Soldatoj, kiuj nur bezonas laboron por vivi) *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# Eĉ la plej klera homo


## POVAS MALPRAVI IAM .

Espereble iu korektas lin aŭ ŝin, por ke la aliaj homoj ne same malpravu. Zamenhof, en sia kreado de Esperanto, faris unu grandan kaj kelkajn malgrandajn erarojn. Bonŝance aliaj Esperantologoj, i.a. Kalocsay kaj Zamenhof mem, (sed ankoraŭ ne la ne-Esperantistoj), trovis la erarojn kaj korektis ilin, se ili povis. Dum la periodo de Kaloksay neniu Esperantologo kapablis korekti kelkajn malgrandajn nek la nuran grandan eraron, nome la forgeson krei unuvortan verban pasivan voĉon. La problemo estas ne ke ni ne kapablas, sed ke ni, ĝuste, ne rajtas ŝanĝi la gramatikajn regulojn en la Fundamento de Esperanto. Tiu plej granda eraro estas kaŭzata de la fakto ke ni, kaj jam Zamenhof, uzis kaj uzas por la pasiva voĉo formojn kiuj havas alian signifon. Se ni montrus al ne-Esperantistoj tiun malĝustaĵon en Esperanto, ili rajte krius ke nia lingvo ne akceptatu de internaciaj instancoj.

Eĉ se la ne-Esperantistoj studus la gramatikon de Esperanto serioze, ili malfacile trovus la eraron en Esperanto, ĉar gravaj eŭropaj lingvoj havas, nerimarkeble, similan eraron kiun ili korektis alie. Etnaj lingvoj ja ne bezonas obei la regulojn de iu "Fundamento". Iliaj lingvoj simple kreis aliajn formojn. (Ekz. *The news was received in time* kaj *The news is still being received).*

La ordinaraj Esperantistoj, t. e. la ne lingvisme studintoj, tute ne interesiĝas, nek povas interesiĝi, pri la kelkaj eraroj de Zamenhof. Ili akceptas Esperanton tia kia ĝi uzatas el de la komenco de la lingvo. Ili eĉ akceptas kaj uzas la erarojn komencitajn dum la ĵusaj cent jaroj, kaj ofte enkondukitajn de nekleraj Esperantologoj. Ja kontraŭe al la etnaj lingvoj, en kiuj eraro tuj atakatas, la Esperantologoj estas ĝenerale akceptataj kiel sufiĉe kleraj, ĉar por ne malutili al Esperanto oni ne ŝatas kritikadon inter la Esperantologoj.

Nelonge antaŭ sia morto, Kalocsay ekkriis, en kunveno de Esperantaj gramatikaj specialistoj, "Do Esperanto ne posedas verban pasivan voĉon!". Kaj li pravis, same kiel kelkaj antaŭuloj, kiuj penis sed ne povis solvi tion, kreante verban pasivan voĉon. Tiuj lastaj ne sukcesis, ĉar aŭ ili uzis jam alisignife uzatajn vortojn, aŭ ili kreis neologismojn, novajn vortojn, do ne oficialajn. Kaj la Esperantistoj en tiu tempo ne ŝatis akcepti neologismojn. Sed bonŝance, antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, mi trovis regulon neoficialan per kiu Zamenhof reduktis la signifon de finaĵo. Li diris ke se la participaj sufiksoj estas uzataj kiel substantivoj, ili perdas sian ĝeneralan signifon de substantivo kaj retenas nur la signifon de homoj, sed nur kiam ili estas uzataj kiel substantivoj. Li uzis alian klarigon por tiu fenomeno de signiforedukto. Tiu regulo zamenhofa do reduktas la signifon de la substantiva finaĵo "-o-" en certa reduktita uzo. Laŭ tiu principo mi deklaris kaj oficialigis, ke la sufikso "-at-"perdas sian signifon de tempo kaj retenas nur la signifon de pasiveco, SED NUR KIAM "-AT-" ESTAS UZATA KIEL VERBO, DO KUN UNU EL LA KVIN VERBAJ FINAJOJ AŬ KIEL INFINITIVO. Tiel "-ati" estas nun pro Zamenhof la oficiala "verba pasiva voĉo", ĉar la plena signifo de "-ati" preskaŭ neniam estas uzata. Tio solvis la gravan mankon en Esperanto, ekzemple en "La hundo batatis tri fojojn de la viro, kaj nun ĝi plu estas batata de ĝi".



Marcel Leereveld.

**_Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE_**

## Owen Loneragan 97 aĝa





Je la 5a de Junio forpasis nia amiko Owen Loneragan, forta subtenanto de Esperanto ekde ĉirkau 1970. Lia funebra ceremonio okazos ĵaudon, la 17an, kaj post tio mi verkos iomete pli por *AE*. Lia familio anoncis la morton lastan sabaton en *The West Australian* kaj aldonis: *Perdis la mondo noblan homon de paco.* Ja vere. Ripozu en paco, kara samideano. *Vera Payne*

## Pri **Dresden**: AE534



*Wasserspiel* = Akvoludo. Infanoj (plenaĝaj) ludas per akvo formante kanalojn.
La konstruantoj ne uzas la vortojn "muziko", sed eble la turisma reklamo uzas la vorton "kanti" erarige.
Iusence temas pri kanto, ĉar la luda tubosistemo laŭtigas la akvo**plaŭd**adon, kontraŭ normala akvodefluigilo kiu provas silentigi ĝin.

Tiu domo apartenas al *Kunsthof* = ArtKorto, tio estas malnovaj domoj solidaj konstruitaj antaŭ 100 jaroj, kiujn oni renovigis post la fino de GDR kaj tiam aldonis kelkajn artaĵojn, ekzemple tiun ĝirafon



Angle:https://www.classicfm.com/discover-music/dresden-music-house-rain/ *Bert Ŝuman*

## Verko-konkurso pri la pandemio

Verku ion kaj vi eble ricevos bonan premion. Vidu la mesaĝon de Stela Besenyei-Merger.

Kara Nicole,

Mi laboras nuntempe pri verko-konkurso pri la pandemio, ĝi nomiĝas INK.
Mi scias, ke ni ankoraŭ ne ricevis verkon el Aŭstralio kaj Oceanio por la konkurso.
Ĉu vi povus mem verki aŭ plusendi mian mesaĝon al verkistoj kaj verkemuloj de via regiono?

Ĉiu informo troviĝas ĉi tie: https://www.akademio-literatura.org/ink
<https://www.akademio-literatura.org/ink>
La limdato estas la 20-a de junio. La premioj de la gajnantoj estas 500,300 kaj 200 eŭroj.
Ankaŭ ni serĉas la kovrilon de la verkoj! Espereble iu inspiriĝos partopreni.



Koran dankon pro via helpo,
Amike, Stela Sendis al AE-on *Nicole Else*

INTERKULTURA
INK
NOVELO-KONKURSO

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# 'La montoj estas altaj kaj la imperiestro estas for'

**ĈU UNU DOMINA LINGVO POR LERNEJOJ (2021) DE LA CHINA POPOLA RESPUBLIKO ESTAS**

La bela mandarena tra provinco Interna Mongolio: Will education reform wipe out Mongolian language and culture? - Language on the Move

La belega mandarena tra la Perl-rivera delto: Fears for the future of Cantonese as China urges Hong Kong to legally recognise Mandarin (msn.com)

La ekstreme bela mandarena tra provinco Tibet: (PDF) Tibetan-Chinese Bilingual Education | Ghil'ad Zuckermann - Academia.edu (Senpaga PDF-a tezo de profesoroj Ghil'ad Zuckermann kaj Chunlin Yao.)

Por provinco Xinjiang la atuto pri la koncerna lingva politiko estas la xinjianga varianto de la mandarena kiu estas pridiskutata ĉe Wikipedia, Quora kaj aliloke. 2005: The Xinjiang Conflict: Uyghur Identity, Language Policy, and Political Discourse (ethz.ch) 2021: Laŭ raportoj de Amnestio Internacia aperintaj hodiaŭ tra Oceanio en amaskomunikilaro financata de la aŭstralia registaro: China's Xinjiang a 'dystopian hellscape' for Muslims, new Amnesty report says - ABC News



SAME DAMAĜA KAJ ENTRUDIĜEMA KIEL LA UNU-INFANA POLITIKO (1979) DE 'IMPERIESTRO' DENG XIAOPING? *Paŭlo J. Desailly*

---



**3ZZZ** En la elsendo de la 14a de junio troviĝas ,inter aliaj, informoj pri la naturo : vivo de salikokoj aŭ poluado de la oceanoj per bruo, kaj ĝojigos la vojaĝemulojn ekscii ke rapidaj trajnoj en Hispanujo faciligos veturadon pli taŭgan por la medio ol aviadiloj.

La malpermeso iri pli ol 25km for de la domo ankoraŭ validas , do ni ne povas decidi pri dato por la jarkunveno de la Esperanta grupo en 3ZZZ ....*Franciska Toubale*

---

# Interesaj faktoj por Propagando

## .Lernado de fremda lingvo postulas

| | |
|---|---|
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | **Komparu Esperanton** |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo...........................................* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon.........................................................* | ..Unu prononco |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo ..........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Ne ekzistas |
| | ..Unu monda lingvo |

# Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj

Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*

---

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 38**

1). La tutan torton.
2). Ambaŭ (subfrazo + parto de la tuta kombinita frazo).
3). a). Predikativo.
 b) Predikato. *Marcel Leereveld.*

---

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Kia terura vido!

Apud nia domo staris impona eŭkaliptarbo. Antaŭ dek -kvin jaroj la vojolaboristoj kurbigis la padon por piedirantoj tiel ke ili ne paŝu tro proksime de la arbo kaj ne damaĝu ĝin. Bedaŭrinde la ventego, dum la ciklono de la 9a de junio , forblovis multajn arbojn laŭ la ĉefa vojo .La laboristoj tranĉis la partojn, kiuj malhelpis la aŭtomobilojn veturi. Mi vidis la decidanton, kiu staris je la piedo de la bela eŭkalpitarbo kaj rigardis al la supro , tute klare hezitante. Mi ne alparolis lin ĉar li surportis sonsilentigilojn kaj mi konsciis ke li ne povus aŭdi min.



La maŝinoj bruis dum la tuta nokto. En la mateno kiam mi iris por kontroli ĉu la vojo nun estas senigita de ĉiuj falintaj arboj , mi ne povis reteni krion, vidante kia nun aspektas la ŝatata arbo. Ĝi malkomfortigas la pasantojn kiel tro granda peniso , kiu vane strebas atingi la ĉielon .
Mi sentas por arboj same kiel oni kutime sentas por homoj : Se la novaĵbulteno anoncas la morton de cent homoj pro iu kialo , la nombro "cent" registriĝas en la cerbon kiel fakto . Sed se oni persone konas unu, tiu anonco kaŭzas grandan emocion kaj penon.
*Franciska Toubale*

Mi tre ĝojas ke wi-fi revenis al nia hejmo antau kelkaj minutoj. Pro la ŝtormo pasintan merkredon ni ne havis elektron , telefonon kaj interreton . Sed ni travivis.



Amike al vi, *Franciska*

# Universala baza enspezo (UBI)



## Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.

**Tio helpos solvi multajn nunajn problemojn de la tuta homaro** *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***